

ĈEA-retkomunikoj 2/2001

CxEA-RETKOMUNIKOJ n-ro2: Esperanto-arangxoj

Hodiaux ni sciigas vin pri kelkaj Esperanto-arangxoj en Cxehxio kaj tion ni volus dauxrigi, ke cxiuj almenaux rete atingeblaj esperantistoj estu dauxre informataj, kie eblas partopreni arangxojn por esperantistoj. Cxu tiu listo de arangxoj estos ricxa dependas ankaux de vi: organizante iun arangxon ne hezitu informi nin.

Do, jen la unuaj sciigoj:

ADONIDO

Tradicia renkontig^o de esperantistoj en Ratíškovice (suda Moravio), kie kreskas rara floro "adonido" (Adonis vernalis, Hlaváček jarní) kaj kie oni g^{uas} vinon c^e popola kanto en vinkelo, realig^{os} 20.-22. 4. 2001. Atentigu pri la renkontig^o en viaj kluboj. Interesig^{antoj} skribu al Jana Melichárková, 696 02 Ratíškovice 938, melicharkova@quick.cz, tel. 0628/367 404

53-a IFEF-KONGRESO en TÁBOR
gxis nun aligxis 180 paroprenontoj el 17 landoj.
realig^{os} en la tagoj 12.-19.5.2001

Alig^{ojn} akceptas kaj informojn donas:
IFEF-kongreso@kava-pech.cz
www.kava-pech.cz/IFEF-kongreso

100 jaroj de Esperanto en Brno

festos Klubo de esperantistoj en Brno sabate la 26-an de majo 2001 en reprezentaj salonetoj de la magistrato de Brno en la malnova urbodomo de strato Mečová (estos sagoj kaj tabuletoj). Programo inter 9-a kaj 18-a horoj. Ekspozicio pri la 100-jara historio de KE Brno, prelego pri la historio, salutoj de gastoj, koncerto de Helena Halířová kaj de sxiaj lernantoj (el Nacia Teatro en Brno), post tagmang^o koncerto de M. Smyčka, diskutado pri la futuro de la movado. (Kotizo 50 Kč pagebla surloke)

Au^{spicion} akceptis la urbestro D-ro P. Duchoň.

Por interesatoj pri tagmang^o ni sekurig^{os} lokon en proksima restoracio.

Skribu al:
Klub esperantistů Brno
p/a Miroslav Malovec
Bosonožská 15/10
625 00 Brno

tel.: 05/ 4724 0690 (vespere)
05/4521 5433 (laboro - vendejo Buček)
e-mail: starto@clavis.cz

INTERNACIA BICIKLISTA RENKONTIGxO EN DOKSY: IBIRE
estos arangxita 5.-9.9.2001 kun antauxarangxo (ankaux biciklista) en
Dobrichovice 2.-5.9.2001.
La plej favoraj aligxkotizoj validas gxis la fino de majo.

Interesatoj rigardu www.kava-pech.cz/ibire aux skribu al
info@kava-pech.cz

LA 8-A KONFERENCO DE C^EA

okazos en la tagoj 19.-21.10.2001 en Poděbrady
enkadre de la festado de datreveno de reg^o
Georgo de Poděbrady (1420-1471). Detalojn alportos
Starto.